# EKO 2014-39: Meze en la AMO

Pasis jam du tagoj de la AMO-seminario en la 81a Itala Kongreso. Ambaŭ el la kvarhoraj sesioj estis bone ĉeestataj, kun po ĉ. 25 partoprenintoj, ne komplete la samaj, tiel ke entute partoprenis ĝis nun 32 personoj, el ses landoj. La kadra temo estis 'Kiel altigi la prestiĝon de Esperanto'.

Lunde, la 25an de aŭgusto, dum alvenadis partoprenontoj en kvaropoj oni prezentis sin per intervjuaj teknikoj, skizis siajn esperantistiĝojn kaj interesiĝon pri la temo. Poste komenciĝis la enkonduko. Tio skizis la bezonon por aktivula trejnado (niaj novaj generacioj ne kreiĝas aŭtomate), la celojn de la AMO-prograMo de UEA, kaj la koncepton de Seminarioj Pri Aktivula Maturigo (interna nomo: SPAMO). Estis montritaj la bazaj dokumentoj pri la prograMo (akireblaj laŭpete); sekvis resumo pri la okazintaj kaj okazontaj seminarioj, en 2014 tra kvar el kvin kontinentoj de la mondo. Emfazite la graveco arigi kaj publikigi rezultojn, tasko, kiu kune kun aliaj, bezonos nomumigon de AM-administranto.



Foto: Amri Wandel.

Sekvis grup-ekzerco, por kiu estis starigita nur du pritemaj demandoj: Kiuj formas niajn plej utilajn celgrupojn, kaj kiuj estas konvenaj mesaĝoj por ili? Grupoj nomumis protokolanton. Grupoj rajtis listigi senlime celgrupojn, sed devis indiki, kiuj laŭ ili estas la plej promesplenaj.

### *Grupo 1:*

**Celgrupoj** (prioritataj)**:** ĵurnalistoj, legantoj, instruistoj kaj lernejoj. **Celtemoj**: Ĉefa temo en multaj landoj estas la nebona stato de la ekonomio. Por vidigi Esperanton, necesas iel ligi ĝin kun aktualaj temoj; proponindas la ekonomiaj avantaĝoj de la uzado de Eo.

### *Grupo 2:*

**Celgrupoj**: homoj sopirantaj internaciajn kontaktojn por neprofesiaj kialoj. Fakaj grupoj bezonantaj internaciajn kontaktojn. **Mesaĝo:** Eo estas viva, uzebla lingvo.


*Grupo 3:*

**Celgrupoj** (prioritataj): Instruistoj, Junuloj kaj infanoj, Emeritoj, Fakuloj, Laborantoj por plibonigi la mondon (similideanoj), Studentoj povantaj per studo ricevi kreditojn, Laborantaj por reciprokaj rajtoj; Politikaj kaj religiaj grupoj, ĵurnalistoj. **Mesaĝoj:** fascina, justa, facile lernebla lingvo kiu celas similon kiel la celgrupo, lingvo, kiu ebligas internaciajn kontaktojn, lingvo povas subteni laboron por atingi celon; reciproka subteno kaj kunlaboro kun celgrupoj.

Por rapida resumo, ĉiu grupo rajtis proponi nur unu celgrupon, kun konciza diskuto pri la rilataj mesaĝoj. Grupo 1 elektis ĵurnalistojn, ĉar ili muldas la publikan opinion. Grupo 2 elektis pli ĝeneralan celgrupon: homoj volantaj aŭ volontaj internacian komunikilon, sed ne por profesiaj kialoj (ĉar tiuj plej verŝajne jam akiris alian solvon), Grupo 3 proponis 'similideanojn', do homoj laborantaj por pli bona mondo.

Ĝis la paŭzo gvidis Stefan MacGill, post la paŭzo gvidis Sara Spanò, kiu aktivas en la rondoj de TEJO, kie ŝi lastatempe transprenis respondecon pri ilia programo de Aktivula Trejnado.

Provokaj estis ŝiaj komencaj frazoj: "Mi estas via gvidanto; mi estas virino, sekve mi estas __a, __a kaj ___a, mi estas plie italino, do ___a, ___a kaj ___a, eĉ plie mi devenas el suda Italio, do mi estas ___a, ___a kaj ___a!  La ellasitaj adjektivoj ĉiuj prezentis stereotipajn juĝojn pri virinoj, italoj kaj suditaloj.  Tio portis nin al klopodoj difini la koncepton 'antaŭjuĝo'. Respondoj: nepruvita kredo, kutimaj diroj, juĝi antaŭ ol koni, juĝi sen sufiĉaj konoj aŭ eĉ juĝi anstataŭ koni. Tiuj misperceptoj kaj tro fruaj prijuĝoj povas fonti el bezono por homoj simpligi la ĉirkaŭan mondon por igi ĝin pli traktebla. Konoj kaj opinioj formitaj en frua aĝo, ofte sub influo de gepatroj, pruviĝas tre malfacile ŝanĝeblaj en pliposta aĝo. Homoj malemas pridubi siajn vidpunktojn; prefere ili fortigu siajn kredojn por stabiligi sian mondbildon. La sekvo estas diagramo pri la ekformo kaj fortiĝo de antaŭjuĝoj:




En du iom grandaj grupoj la seminarianoj ricevis la taskon listigi la renkontitajn antaŭjuĝojn (aŭ prijuĝojn) pri Esperanto. Rapide ili arigis suprize grandan kolekton. Jen resumo de la rezultoj de ambaŭ grupoj – kiuj grandparte venis al similaj rezultoj:

-- Artefarita; senpopola; mikspota lingvo; gesta lingvo, kreaĵo de nur unu persono.
-- Morta lingvo (neniam aŭdis/aŭdas pri ĝi), havis ŝancojn sed malsukcesis.
-- Lingvo por frenezuloj, idealistoj, utopiistoj.
-- Lingvo de judoj…/spiritistoj… / anarkiistoj… /komunistoj… sekreta lingvo de sektoj…
-- Neutila, nebezonata lingvo – 'por mi funkcias la angla'. Neprestiĝa lingvo.
-- 'Mi ne sukcesis ĉe la angla – kial mi provu plian lingvon?'.
-- la stud-programo en lernejoj estas jam plenŝtopita de lingvoj – ne aldonu plian!
-- plejparte eŭropa lingvo, ne vere universala. Tro simila al latinidaj lingvoj por esti serioza.
-- malmultaj parolantoj, nesufiĉa vortostoko, nesufiĉe fake evoluiĝinta.
-- la lingvo disdialektiĝos, kiel ĉiuj uzataj lingvoj // la lingvo ne povos evolui kiel viva lingvo.
-- lingvo por privilegiuloj kun rimedoj vojaĝi // lingvo por malriĉuloj.
-- lingvo danĝera, ĉar helpos mortigi minoritatajn kaj minacatajn lingvojn.

Sekvaj demandoj: kial ekzistas tiom multaj misjuĝoj? (Vidu Claude Piron por respondoj!) Kiel esperantistoj reagas al tiaj antaŭjuĝoj? Ne ĉiam tro saĝe!

Eblas formuli argumentojn por kontraŭi tiujn misperceptojn, sed oni ne ĉiam havos okazon prezenti ilin, kaj en kazoj de forte kredataj prijuĝoj, rekta kontraŭ-argumentado malverŝajne ne sukcesos.

Prefere al ripeta kontraŭado al tiuj opinioj estas kompreni ilin, kaj konstrui manieriojn konigi alternativajn bildojn pri la lingvo, kiuj malpruvos plurajn el tiuj mitoj. Sed por tion bone fari oni bezonas kritikan mason – kaj de Esperanto-uzantoj, kaj de komunikantoj pri la vera situacio de la lingvo.

La sekva paŝo, kiu ne povis ricevi sufiĉan tempon por plena disvolviĝo estis pri la prijuĝoblokoj demandi: 'Kial la homoj levas tiujn pensojn, kaj kial tio negativigas sian opinion pri la lingvo. Ekzemple, pri 'artefarita', la homoj preferas ion naturan. Pri 'morta, neutila, senprestiĝa', homoj timas tempoperdon en io kiu ne ŝajnas 'kostefika'.

Plia ŝtupo, ankaŭ tempe limigita: kiel reagi al iuj antaŭjuĝaj deklaroj. Kontraŭ la juĝo 'senutila' eblas demonstri la eblon tre rapide kaj frue en la lernado ekuzi ĝin – por korespondi, skajpi, ekvojaĝi. Pluraj grupanoj rakontis kiel ili en konvinkado citas epizodojn el sia persona sperto. Dirite: kompreni la ecojn, dezirojn de via konversacia partnero. Tiel, la publiko jam mem montris sian komprenon de la sekvaj temoj de la sesio.

Konsilo: Ne rekte kontraŭbatalu firme tenatajn opiniojn – starigu alternativan bildon. Alia vidpunkto: iuj antaŭjuĝoj estas facile dementeblaj, sed pli malfacile estas akiri okazon prezenti tiujn dementojn en amaskomunikiloj: radio, televido ks.

Fine, Sara Spanò prezentis du tipojn da inteligenteco, kiuj rilatas al nia temaro:

Emocia inteligento – implicas koni vin mem
-- implicas kunsentadon – empation kun aliaj
Konversacia inteligento – kiel eniri kaj mastrumi konversacion
-- evoluigi kapablojn gvidi konversacion kien vi volas
-- rilatas al pli ol nur la uzitaj vortoj

Klare ni konstatis, ke multaj antaŭjuĝoj havas emocian flankon aldone al racia flanko, sekve la repliko prefere enhavu ne nur raciajn sed ankaŭ emociajn aspektojn. Konversacia inteligento estas lastatempa eltrovaĵo (el ĉ. 2010), ĉefe por uzo en komercaj negocoj, sed ĝi povas havi ankaŭ por ni utilajn instruojn.

Sekvos per aparta sendo la raporto pri la marda progrAMo.

AMO-IT GAZKOM LUNDO.doc

Estrara Komuniko 2014-39 sendita el Fai della Paganella la 27an de augusto.